# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale

PLENUMITA 30/09/2021 Kvincentkvindeka eldono (unua eldono 20/09/2011)



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

***Uzindaj ligoj*** *Google Translate* *Plena Ilustrita Vortaro* *Freelang Vortaro*
*lingvohelpilo* *PMEGramatiko* *Esperanta Retradio* *Plena Analiza Gramatiko*

*Pasintaj AE eldonoj* *Esperanta himno* *duolingo entute* *openclipart.*

**Forĵetu viajn vortarojn.** Uzu *Google Translate* Kiel vortaron

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj" korektitaj atingeblas je la suba adreso**
Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo
Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

## Entute 812,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas 280,000 lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas 227,000 lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas 199,000 lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)
Nun studas 106,000 lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )
Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde februaro 2022)

## Surhavu vizaĝmaskon.



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.**

Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la koronaviruso. Do portu maskojn. *Roger Springer*

## Universala baza enspezo (UBI)



Por pli kontentiga kaj sekura mondo

Ĝi helpus monon flui tra nia ekomonia sistemo sen senutila laboro

Ekonomioj funkcias per la fluo de mono.

Universala Baza Enspezo ebligas ĉiujn havi monon por helpi la fluon de mono.

**Artikoloj por AE**. Se vi trovas taŭgan artikolon por AE kaj ne fidas vian Esperantan nivelon, uzu la aŭtomatan tradukilon de Guglo kaj sendu ĝin rekte al AE rogerspringer@tpg.com.au;



# Liberiga Tago



# Si vis pacem ...



*Si vis pacem, para bellum* ... Se vi volas pacon, preparu militon.

Antikva saĝaĵo, ĉu ne, kaj des pli impona, ĉar ĝi estas en la latina. Ĝi gvidis la eksteran politikon de la romianoj -- ke ĝi estis uzata por sekurigi la potencon de la regantaj klasoj en la Imperio mem, ni ne menciu -- kaj ĝi validas ankoraŭ hodiaŭ, ĉu ne?

Bedaŭrinde la diro estas tute falsa. Ĝi devus esti: *se vi preparas militon, vi garantias, ke iam estos milito.*

Se miaj najbaroj scias, ke mi preparas militon, ke mi akiras ĉiam pli da armiloj, kion ili faru? Kompreneble ili mem devas armi sin, eventuale formi aliancojn kun aliaj najbaroj kontraŭ mi. La Unua Mondmilito montris, ke aliancoj povas konduki en multflankan militon.

Ĉu la homaro ne sufiĉe evoluis por kompreni la tragedian falsecon de tiu antikva slogano? Se oni observas la naciismon, la prestiĝavidon de la aktualaj registaroj, kaj la ŝafosimilan pretecon de multaj civitanoj obeadi, la respondo estas deprimiga.

Aŭstralio estas relative riĉa mezranga lando, kaj unuavide ĝi ne havas evidentan "malamikon". Sed ekde 1941 niaj registaroj "preparas militon" siamaniere, ke ili nepre volas kaŭri sub la "protekta egido" de Usono, tiu superpotenco kun siaj militbazoj sur ĉiuj kontinentoj, kaj en multaj landoj rigardata kiel la ĉefa minaco al paco. Kie Usono militas, tien Aŭstralio sendas soldatojn: al Koreio, Vjetnamio, Afganio, Irako. Krom tio, Usono regas partetojn de Aŭstralio, kies instalaĵoj ne permesas eniron eĉ al la aŭstralia ĉefministro. Kiam usonaj droneoj detruas homojn en Mezoriento, "niaj" instalaĵoj gvidas la droneojn.



Fakte, la sola pravigo de eventuala alilanda atako kontraŭ Aŭstralio estus ĝuste tiu "danĝera alianco" (esprimo de iama konservativa ĉefministro Malcolm Fraser).

Estas tempo por iom modifi la antikvan saĝaĵon: *si vis pacem, para pacem.* *Trevor Steele*

**3ZZZ** La kantoj en la elsendo de la 27a de septembro 2021 estas kantoj premiitaj la 12an de septembro kadre de la 9a Eŭropa festivalo pri esperantaj kantoj. Aldone tejano plendas pri Esperantio kaj proponas solvojn. Ankaŭ ĉokolado estas unu el la temoj .



*Franciska Toubale*






(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917

## EKSTRAÎOJ ĈE LECIONOJ EN LA "THE ESPERANTO-TEACHER"

(de Mason Stuttard). N.ro 54 de "Por Komencantoj".




GRAMATIKAJ KVIZETOJ: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:

1). Ŝanĝu la jenajn du pasivvoĉajn frazojn al aktivvoĉaj:

A). "La baroj estas disbatitaj de la sankta amo".

B). "La baroj disbatatis (= estis disbatataj) de la sankta amo".

2). Metu en la aktivan voĉon la jenajn kvar pasivvoĉajn frazojn:

A), La infanoj akompanatis (= estis akompanataj de la patro.

B), La infanoj akompanatis (= estis akompanataj) de la domo.

C). De la patro akompanatos (= estos akompanataj) la infanoj.

Ĉ). De la domo akompanatos (= estos akompanataj) la infanoj.

3). Traduku en la anglan lingvon la jenajn aktivvoĉajn frazojn:

A). (kompleta ago el de komenco ĝis fino): "La fiŝon ni manĝas nun dum la vespermanĝo".

B). (nekompletigita ago) "Ni nun estas manĝantaj la fiŝon".

C). (kompletigita ago kies efikon ni sentas nun) "Ni estas manĝintaj la fiŝon antaŭ horo".

Vi trovos la solvojn de la kvizeton ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. n.ro 550.

Marcel Leereveld.

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★



(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917

# Milito pluigas ekonomian batalon.

### PRI TREVOR-AĴO.

Trevor pravas pri la ekzamenoj, sed mi uzis la novajn nur kiel alternativoj, kaj ili tiutempe estis tre popularaj, kaj ne facilaj ĉar la kandidatoj devis antaŭlerni kaj scii ĉiujn ducent aŭ mil vortojn kaj parton aŭ la tutan gramatikon. Krome ili formis ekstrajn interajn facilgradojn, la Bazan antaŭ la Elementa kaj la Mezan inter la Elementa kaj la Supera kaj la Alta inter la Supera kaj la Klereca. Nuntempe ni ne bezonas ilin, ĉar la homoj ne plu volas fari ekzamenojn kaj ricevi diplomojn. Marcel.

### LERNU EL LA PASINTECO !

Oni nuntempe multe diskutas pri kion fari pri la kontraŭeco inter Usono kaj Ĉinujo. Ĉu militi antaŭ ol Ĉinujo fariĝas tro forta? Ĉu bati Ĉinujon per ekonomiaj taktikoj? Ĉu Aŭstralio restu neŭtrala?

Ankoraŭ neniu menciis, trovi la solvon en antaŭaj periodoj. La unua mondmilito kaj la dua mondmilito ne okazis pro deziro, sed pro neceso. En ambaŭ kazoj Usono kaj Britujo kaj Francujo sukcesis plifortigi sian ekonomion je la kosto de Germanujo, kies komerco fariĝis pli kaj pli malforta, precipe la metaloindustrio. Ĉi lasta estis (kaj estas) precipe en la manoj de la grandega firmao Krupp, kiu do, sed ne publike, devigis Hitler'on militi en la dua mondmilito. Post la lasta mondmilito, por havi bastionon kontraŭ Rusujo, la usonanoj lasis Germanujon kreski sufiĉe forta. Tiuj antaŭmilitaj malriĉigoj ante al Germanujo kaŭzis la eksplodojn de la militoj.

Simila situacio okazas nun kontraŭ Ĉinujo, kaj Usono organizas ĉion eblan por malriĉigi kaj malfortigi Ĉinujon. Pro tio estas eĉ ebla, ke la nuna viruso estas en Ĉinujon plantita de Usono, ĉar antaŭ la virusa eksplodo Usono jam publike kreis, en Usono, kaj eksperimentis kun biologiaj armiloj. Tio estas nur eblo, kaj la viruso povas esti kreita de Ĉinujo mem, kaj eskapis. Oni plu penas esplori tion.

Samtempe Usono preparas sin por eventuala milito kontraŭ Ĉinujo, kaj kruzigas armeajn ŝipojn en la Sudĉinmaro, internacia maro. Tiu maro limas kun Ĉinujo, Vjetnamujo, Pilipinio, Tajvano, Kamboĝo, kaj Malajzio, kaj eble iomete Indonezio. Ili teorie povus postuli 200 km el de la maro, sed praktike interkovras. Neniel limas kun ĝi Japanujo nek Aŭstralio. Nur Ĉinujo postulas la tutan maron, nerajte. Sed la maro estas tre grava internacia travojaĝa tereno por atingi Japanujon kaj Siberion kaj Nordamerikon, krom la limantajn landojn, do grava por preskaŭ la tuta mondo.

En ĉi supra situacio Usono sin preparas por milito kontraŭ Ĉinujo, simple ĉar Ĉinujo konkurencas sukcese kun Usono kiel ekonomiaj konkurencoj, kaj tial ankaŭ kiel militaj konkurencoj. Do ekzistas du landoj pretigantaj sin por tia milito, sed ĉar Usono neniam deziras militi en sia lando, ĝi bezonas Japanujon kaj Pilipinion kaj Aŭstralion kiel batalkampojn. Ĝi por tio preparis kaj –as tiujn landojn, kiuj ja akceptis la rolon de batalterenо. Sed nun regas daŭra interdiskutado, ĉu Aŭstralio devis akcepti la rolon, kaj kelkaj tre konataj politikistoj asertas ke ni estu neŭtralaj pri la internaciaj roloj de Usono kaj Ĉinujo. Similaj diskutadoj okazas en eŭropaj kaj aliaj landoj. Kio estas pli necesa, eviti teruran nuklean militon aŭ reteni sinkantan ekonomian potencon usonan? Ankaŭ mi opinias ke vivi sub eble diktatora reĝimo ĉina estas preferinda al la suferegigaj konsekvencoj de nuklea militado. Speciale Japanujo kaj Pilipinio kaj Aŭstralio, kaj ankaŭ la ĉina popolo, suferegos. Usono jam testis siajn novajn biologiajn armilojn en Vjetnamujo, kun terura suferado de la mezvjetnamuja popolo. Pro tio Keating kaj aliaj proponas sendependan Aŭstralion penantan interveni por eviti militon usonan. Eŭropaj landoj simile pensas.

Krome, ĉar Aŭstralio subskribis la Nuklean Nedisigadan Pakton (*Nuclear Nonproliferation Pact*), en kiu Pakto de la Unuiĝintaj Nacioj la subskribanto promesas ne uzi nek havi nukleajn armilojn ekster sia lando, pro tio Aŭstralio faros internacian krimon havi ŝipojn kun nukleaj armiloj en la Sudĉinmaro (kiel postulas Usono). Sendepende de ĉu Francujo koleras aŭ ne. Honto al nia ĉefministro! *Marcel Leereveld.*

(*Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*



## SOLVOJ DE LA KVIZETOJ:

1). A). "La sankta amo disbatis la barojn".
B). "La sankta amo disbatis la barojn".
2). A). "La patro akompanis la infanojn".
B). "Oni akompanis la infanojn de la domo".
C). "La infanojn akompanos la patro ."
Ĉ). "De la domo la infanojn akompanos (la patro)
3). *A). We eat the fish now during the evening.*
*B). We now are (in the process of) eating the fish.*
*C). We have eaten the fish an hour before.*
. *Marcel Leereveld.*

# Kio okazas en mia ĝardeno?



En tiu tempo de deviga endomigo, posedi ĝardenon estas benaĵo, des pli ke la fakuloj nun agnoskas ke la manko de cirkulado de la aero en apartamento aŭ publika konstruaĵo favoras la disvastigon de la koronaviruso . Ni restu ekstere kiel eble plej longe. Tamen tio estas ankaŭ fonto de elreviĝo kaj malespero.

Mia kunulo, Bernie, plantis "macademia"nuksujon antaŭ 50 jaroj.Legendas la nutra kvalito de tiu nukso. Antaŭ kelkaj jaroj li malkonstruis la malaltan ŝtonmuron, kies rolo estis reteni la grundon dum forta pluvo, ĉar la tereno estas forta deklivo, pensante ke tie sin kaŝas la ratoj, kiuj amasigas la truitajn ŝelojn . Poste ni povis frandi pli grandan kvanton de nuksoj.

Sed, oh ve , antaŭ kelkaj tagoj , kuŝis sub la arbo branĉetoj kaj rompitaj ŝeloj. Kiu besto kapablas frakasi la ege malmolan ŝelon de "macademia" nukso? Mi ne tro longe atendis la respondon. Sufiĉe rapide mi rimarkis aron da nigraj kakatuoj, sidantaj sur la altaj branĉoj de la apuda "angophora"arbo . Kiam mi, per bastono, frapis la trunkon de tiu arbo, nubo da nigraj flugiloj ekflugis al la eŭkaliparbo je la alia flanko de la nuksujo. Mi rezignis la provon ĉasi ilin. Mi devas akcepti ke en la naturo homoj ne ĉiam venkas, ke homa plano kaj deziro ne ĉiam plenumiĝas. Kompense mi havas la oportunon ĉeesti iliajn al mi ne kompreneblajn kverelojn , kiujn akompanas stridaj krioj, kaj admiri la graciecon de iliaj movoj .

*Franciska Toubale*





## Mi serĉis la interreton por kontraŭ militaj Aŭstraliaj politikaj partioj.

Se Aŭstralio ne volas neniigan militon kun Ĉinio, ni devus ĉesu tion, kion ni nun faras

*Australian Citizens Party* [View Email in Browser (enudgemail.com.au)](enudgemail.com.au) *Roger Springer*

Ankaŭ *the Socialist Equality Party, SEP* La nunaj politikistoj nur helpas Usonajn militojn